



BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 1/2002 (164)

Březen / marto 2002

Enhavo - obsah:

Eli Urbanová ŝatas nian klubon	2
B. Němcová: Fabelo pri la koketo kaj la kokineto	5
Z. Bergrová: Nigra reĝidino	6
Utopie, která je už dávno skutečností (o knize U. Eca)	9
K. Havlíček - Borovský: Reĝo Lavra	11

Jiří Karen

Omaĝe al Praga Klubo, kiu festis sian 90-jaran jubileon de naskiĝo 1992

La praga klubo aĝos baldaŭ cent jarojn.
Ĉiu ajn la historian horizonton estime
observas

Esperanto? Io la aviadilon similanta

Pli gaje ni ĉeĥoj omaĝus la jubileon
Se Prago lokiĝus en Parizo
Niaj klubnoj grimpus ĝispinten
De la Eifelturo
Ni marŝus sub la triumf-arko

Reveninte hejmen ni povus pagi
per frankoj

Se nia klubo sur Picadilly sidus
En Londono

(kie teroristoj aktivas
kaj bomboj eksplode parolas)
Certe ili ne atakus tiujn
Kiuj perfekte majstras Esperanton
UEA delegito ĉi tie bone invitita gasto

Se nia klubo sidus en Berlino aŭ en Bonno
Ni facile kolektus surstrate
Unu milionon

Kiom da varoj povus kontraŭ tiu sumo
Aĉeti nia klubo (unu marko =
18 ĉeĥaj kronoj)

Kaj se nia klubo loĝus en Romo
Plej ĝue en Vatikano
Nia ano certe estus la sankta Papo
Ĉar Esperanto plaĉas
Al Dua moŝto

Se nia praga klubo estus en Vieno
Ni senpage irus legi librojn en Kaiserhoff
La pordisto vidante kvinpintan stelon
surjake

Li certe al ni profunden klinus la kapon
Kaj mi certe verkus ĉi tie
Unu trafe belan strofon
Se nia klubo en Pekino
Sian sidejon havus
Ni perpiede sur la ĉina muro turistadus
Ne bezonante multekostan fervojon pagi
Radio estus por ni je dispono

Praga klubo
Al via monumento
Mi la laŭron dornoplenan donas
Kun deziro
Ke al nia klubo
Aliĝu la riĉa veziro

*(Kantoj de vaganto sur planedo
Goja Gojmalo)*

Eli Urbanová ŝatas nian klubon

Apogseĝo por la gasto

Eva estas kiel neoldiĝanta Elin Makropulos, origine Emilija Marti, el la teatraĵo de Karel Čapek. Eĉ en siaj - eĉ en sia aĝo, ŝi estas ĉiam kiel vergeto. Ĉar ŝi manĝas kiel pasero! Al Nederlando ŝi vojaĝis kun bulko en poŝo! Desertojn, kiujn mi al ŝi antaŭmetas, ŝi ne tuŝas. Ŝi volas kafon. Nigran. Sen sukero.

- Esperanton mi ekregis aŭtodidakte, sen instruista helpo. Kiam tio estis - en la jaro 1949. Hromada al mi donis nur kelkajn konsilojn. Sed kun li mi konatiĝis pli tarde. Post naŭ monatoj mi faris pri tiu ĉi lingvo ŝtatan ekzamenon.

Pli bonan interpretistinon Hromada ne povis deziri. Kiel koncentriĝe li aŭskultis, kiam Eva Suchardová recitis sian ŝatatan poeton Šrámek en lia traduko. Sed ankaŭ nin ceterajn ŝi fascinis. Kiel aktorino, kiel esperantistino, kiel virino. Sur la tabuloj de Eta Sceno ŝi kreis vicon da neforgeseblaj roloj. Nora de Ibsen, Patrino de Čapek, Mechemene Baŭu en la Legendo pri amo de Hikmet, dum persona ĉeesto de la aŭtoro... Kie estas la erao de niaj komencoj, kie estas la „tempo de framboj nematuraj“, ĉu ne, Eva? Kie estas akademiano Hromada? Arkitekto Drlík, tiu havis maltrankvilan estintecon. Li estis de Gestapo kondamnita al ekzekuto, fuĝis el veturanta trajno, kaŝadis sin, estis kaptita, organizis ribelon en la prizono... (Iam oni parolis pri Eva kaj Drlík deklaris laŭte kaj antaŭ ĉiuj: Mi mem ne konas pli antipatian inon!... Drlík estis efektive kuraĝa!) Kie estas Jan kun sia rakontado pri Hindujo? Kaj Ŝtefo, kun kiu mi vivis preskaŭ dek tri jarojn? Kaj via edzo Tonda? Sur fingroj oni nin, memorantojn, kalkulus...

- Sed estis ni tiam bubinoj, junaj, ĉarmaj, unu poetino, la dua aktorino...Eĉ se ni reciproke agnoskis nin, tamen propre iel subkonscie ni konkuris pri la unua loko antaŭ la Esperanta publiko... Ĉi tie mi devas al Eva oponi. Mi kun neniu konkuris. Fakte estas, ke ni unu al la alia iom „fuŝis en la metio“. Mi prelegis miajn versojn (laŭ Eva nepre terure) kaj Eva provis pri poezio. Kio min kompreneble ne konfuzis. Mi ŝin aprezis kiel aktorinon. Konkrete en jena odo: *Unue la impresoj / de ege belaj kruroj. / Mi ĵurus, ke al ili/fiksiĝis la okuloj. / Detalo: Harlinio. / Sangema bril' de broĉo. / Kaj tamen tre, tre baldaŭ / nenio - nur la voĉo. / Via ton' tragedia! / Iu poŝtukon serĉas. / Ĉar vi estas unika, / kiam vi larmojn verŝas... / Jes, Eva, al vi rozojn! / Bukedon grandan, sciui! / Kaj al la kor' vin premi / kaj danki por ni ĉiuj... / Odo neodo, kun ĉiu Eva amuziĝis, nur kun mi ne. Malgraŭ tio ne estus de mi lojale, se mi pri ŝi, pri la stelo de la Praga Esperanta Klubo ne raportus al Baghy. Mi stulta! Se mi al ŝi almenaŭ ne donus lian adreson!*

- Kiam mi konstatis, ke vi ĵaluzas, mi komencis vin sekrete provoki. Ne pro ia malicemo, sed el pure profesia scivolo. Interesis min, kiel vi reagos, kondutos, kio estos videbla sur vi...

Foje Baghy al Eva, al sia „malbone edukita infano“ skribis: „Mi revis pri organizado de aktorgrupo, ĝia nomo estus Verda Ĉaro, kiu migre vizitus la grandajn urbojn de la mondo por prezenti tie artajn vesperojn, sed intervenis la milito... Ĉu vi ne volus transpreni tiun taskon?“ Klare, ke Eva volis. Ŝi havis ĉirkaŭ si tiutempe kolektivon de junaj homoj, esperantistoj, entuziasmaj por teatro, ja amatoroj, sed tre talentaj. Ŝi havis eĉ sian reĝisoron Tonda Seemann. Decembre 1954 ili la unuan fojon uzis la indikon Verda Ĉaro de Julio Baghy. Ilia sendube plej sukcesa ago estis Pigmaliono de Shaw. Post ĝia enkonduko dum la 44a Universala Esperanto-Kongreso en Varsovio en la jaro 1959 ĉi tiu ensemblo bedaŭrinde disfalis...

Kiel finiĝis la petolado de kato kun muso? Bone. Eva min petis pri miaj poemoj... Sincere dirite, ŝia enmiksiĝo ne entuziasmigis min. Kontakto kun la geaŭskultantoj al mi mankos. Krom tio mi opinias, ke deklamo de la aŭtoro, eĉ se laika, havas ion en si...

- Via pasia liriko estis por mi kvazaŭ kreita. Iam ĝi estis por mia gusto tro erotika, sed mi povis elekti. Tio ne estis poemoj, tio estis minutaj dramoj vokantaj je mova elmontrito...

Ja Eva. Se mi ŝin komparas al la neoldiĝanta heroino Makropulos de Čapek, mi scias, kion mi diras. Fari „teatron de unu aktoro“ estas nenia gago. Ĝi signifas paroli kaj paroli kaj paroli. Eble horon kaj duonon! Sen sufloro! Ŝia Božena Němcová - Eva ŝin prezentis en tiutempa kostumo -tio estis travivaĵo. Sed ankaŭ ceteraj staturoj de ŝia ĉeĥa repertuaro vekis meritan atenton. Ja Eva!

Ankaŭ ŝia voĉo ne ŝanĝiĝis. Ĝi estas ĉiam la same velura kaj sugestiva aldo. Kaj ankoraŭ io ne iras al mi en la kapon. Eva en siaj - en sia aĝo ne havas unu grizan haron. Simple Eva estas nekredbla...

- Ĉu vi ne pensas, poetino, ke da tiu tristo estis jam sufiĉe? Eli, vi bezonas masklon!

Eva mem viron ne plu tolerus. Eva ne. Eva vivas nur por sia arto. Ŝi estas per ĝi rekte obsedita. Ju pli plena estas ŝia not-kalendaro, des pli ŝi kontentas. Eva estas hardita. Eva satdormas eĉ en trajno.

- Kvietaj akvoj al artisto ne prosperas. Artisto devas travivi doloron...

Eva Suchardová-Seemannová. Iam mi vane strebis pri ŝia favoro. Eva estis mia rivalino en amo. Hodiaŭ ŝi viciĝas al tiuj kelkaj homoj, kiuj min pesimismeman morale apogis. Interparolo kun Eva ekvaciis al drogo. Mi ne plu estis ruino, homo super tombo, sed poeto, kiu esploras sian doloron el ĉiuj flankoj, kiu estante super la afero pesas ĝian intensecon en ĉiu stadio, tial, por ke li ĝin priverku kiel eble plej fidele...

La kontribuo de Eva Seemannová al la Internacia Renkontiĝo de Pacdefendantoj en Pardubice apartenas al ties tradicio. En la jaro 1987 ŝi studas mian kontraŭmilitan monologon *En Ŝarka pluvas dufoje*. Kiel ĉiam ankaŭ ĉi-foje estos ŝia prezentado ora najlo de la kultura programo... Dume ŝi faras ĝin ĉeĥe. Komence mi larmis, tuj kiam ŝi surpaŝis la podion kaj diris: Kaj mi estas ree ĉe vi, mia karuleto. .. Sed Eva ne diris „mia karuleto“, sed „mia kara“. Laŭdire „mia karuleto“ ne irus al ŝi el la buŝo. Ankaŭ ŝi ne diris "jam neniam plu ni donos al ni kiseton sur la vangon“, sed "jam neniam plu ni kisos nin“. Tio estas tiuj ŝiaj misaj korektoj. Sed la plej gravan ŝanĝon ŝi permesis al si en la fino, kie ŝi ellasis ĉi tiujn vortojn: „Ne venĝo, sed pardono!“ Sed kial? Tamen ne diras tion ŝi, sed Ernesto. Mia kara Ernesto... Li estis tiel homa... Li sente estis tiel alte... Damnita Eva! Kutime ŝi surhavas longan obskure bluan robon kaj vaŝme brunan veluran kitelon, kiun ŝi sur la scenejo demetas. La flavan ŝalon ŝi lasas al si. Ne por nura efekto! Foje ŝi per ĝi simbole al si kovras la okulojn, aliloke per ĝi nerveze skuas, foje ĝin trenas post si... „Ne venĝo, sed pardono!“ Eva ne scias pardoni. Ŝi konfliktis kun Karen kaj de tiam ŝi lin ne konas. Por ŝi Karen estas aero. „Ne venĝo, sed pardono!“ Laŭ mi ne sufiĉas pri la paco paroli, la pacon devus ĉiu el ni realigi en sia ĉiutaga praktiko...

La publiko ofte demandas, kial tiu titolo, kial *En Ŝarka pluvas dufoje*? Kial do... Ĉar en forsto la unuan fojon pluvas efektive kaj la duan fojon, kiam gutas desur la arboj. (Kaj ĉar en *Ŝarka* la unuan fojon mi ploris pro Jan kaj la duan fojon pro Ernesto.) En Prago 4 min en la tiel nomita „apogseĝo por la gasto“ intervjuis populara doktoro Pixa. Li kromalie interesiĝis, ĉu Esperanto enhavas sufiĉe da sinonimoj, ĉar nur tiukaze estas eble esprimi ĉion. Sekve mi povis paroli pri tio, ke nuntempe estiĝas diversaj terminaroj kaj ke ankaŭ ni beletristoj penas la internacian lingvon riĉigi per pliaj esprimoj...

La kafo estas fintrinkita, la temo elĉerpita, la afiŝo anoncanta venontan reprizon de *Ŝarka* transdonita... Mi lumigas en la antaŭĉambro. Eva vestas elegantan pluvmantelon kun zono. Kaj ĝuste ĉi-momente eksonorilis Fanka. Ŝi eltiras el la mansako promesitan libron. - Tio estas mia juna amikino... Tio estas aktorino... Eva rigardis al Fanka trans la ŝultron kaj donis al ŝi la manon kvazaŭ ĝenate kaj ekdeklamis per tono, kiun oni ne forgesas: Seemannová... Tion mi konas! Tion mi konas! Kompatinda Fanka!

Mi apertas en la ĉambro la fenestron preparita al Eva eksvingi. Ŝi ne tumiĝis. Ŝi foriras rapidpaŝe tenante cigaredon... Kaj mi estas ree sola... Tiun vazon alveturigis al mi Ernesto. Por mi ĝi estis tro peza. En tiuj foteloj ni sidis kune nur unufoje... Mi alpaŝas al la spegulo. Kiel tion diras Eva? Kiam virino estas kvardekjara, ŝi devas decidiĝi, ĉu ŝi volas resti svelta kaj havi sulkojn aŭ - mi elektis tion duan. Eble mi komencos gimnastiki. Sed hodiaŭ ankoraŭ ne. Hodiaŭ mi ne emas. Ernesto, amo, kial mi ne ĝemas? Ĉiam, kiam Eva foriras, mi sentas min multe pli forta. Kaj plej mi ĝojas, ke mi skribos pri vi, pri nia romantika mansardo. Sed kiam tio estos?

Antaŭ la dudeka horo mi ŝaltas televidon. Subite telefono. - Ĉi tie Fanka. Mi petas vin, kio propre estis tiu avinaĉo? Kun tiela kreitaĵo mi ĝis nun ne renkontis! Kion ŝi pensas pri si? Ŝi tute difektis al mi la vesperon! Mi ĉiam vidas tiun ŝian superan rigardon, tion, kiel ŝi donis al mi la manon, kvazaŭ ŝi farus por mi ian komplezon, kaj aŭdas ŝian orgojlan: Seemannová... Kvazaŭ ŝi dirus: Reĝino el Sabenujo...

Pavla Zemanová

Granda hundo

Mi forveturis kun la kvarpieda Diko viziti mian amikinon. La vojo estis longa kaj Diko bezonis pisi. Mi haltigis la aŭton ĉe kampo. Pluvis, sed al Diko la pluvo ne ĝenis. Ĝi eksaltis el la aŭto kaj komencis kuradi sur ŝlima vojo. Apud la vojo ĉe elektra gregejo paŝtis sin bovinoj. Diko ĉiujn priflaris. Unu bovino rigardis min kaj post mallonga tempo rigardis nin ĉiuj bovinoj. Mi timis. De vivĝojaj bovinoj nin dividis nur unu elektra drato kaj mi forte kredis, ke ĝi estas vere elektra. Mi kaj Diko komencis reveni al la aŭto. La bovinoj ankaŭ iris kaj malkontente muĝis. Mi turnis min kaj vidis grandan gregon, kiel ĝi iris malantaŭ mi. Rapide mi malfermis la aŭton, alvokis Dikon kaj ankoraŭ pli rapide mi fermis la pordon de la aŭto. En ĉi tiu momento la bovinoj komencis muĝi pli multe, sed ĉi-foje malgajige. Ili opiniis, ke Diko estas bovido. Per tiu ĉi maniero mi komprenis, kial iuj homoj diras al dogoj „vi estas bovido“. Mi jesas, ĉar konfuziĝis ankaŭ la bovinoj.

Por tiu ĉi rakonto nia s-anino Pavla Zemanová ricevis la 3-an premion en konkurso de Esperantista Domo de Kulturo en la bulgara Razgrad. En alia konkurso „Kvizo pri Kroatio“ ŝi ricevis premion — libron „El la Kuirejo de Balkanaj Popoloj“. Gratulon!!!

La membrino de nia klubo, elstara Esperanto-poetino kaj verkistino, eksakademiano, honora membro de ĈEA kaj de UEA s-anino **Eli Urbanová** la 8an de februaro fariĝis 80-jara. Okaze de tiu ĉi grava jubileo ĈEA invitis la poetinon al malgranda solenaĵo, kiu okazis la 7an de februaro en la registara salono de la Ĉefa stacidomo en Prago. La renkontiĝon partoprenis kvindekda esperantistoj ne nur el Prago, sed ankaŭ el aliaj lokoj de nia lando. Gratulis por ĈEA Petro Chrdle, por nia klubo Jindřich Ondráček, la poetino mem deklamis siajn poemojn, pianludis Elena Půchová kaj kantis Miroslav Smyčka.

„Rapide pasas temp“ estas la titolo de la „definitivě lasta kolekto“ de Eli Urbanová; tiun poemaron aperigos eldonejo KAVA-PECH.

Pere de nia Bulteno la poetino multe dankas por ĉiuj favoresprimoj, kiujn ŝi ricevis okaze de sia vivjubileo. Nome respondi al tiom da gratulantoj estas ekster homaj ebloj...

La 25an de aprilo festos sian 80-jariĝon **d-ro Josef Kavka**, CSc., elstara sciencisto-geologo, specialisto pri petrologio. Li multe laboris por penetrigi Esperanton en sciencajn rondojn.

Li estis aktivulo kaj honora membro de Internacia Scienca Asocio Esperantista, landa delegito de ISAE (1961 - 1973), ĝenerala sekretario de ISAE (1971 - 1980), ĉef-redaktoro de Scienca Revuo (1978 - 1987), en 1965 li fondis Geologian Sekcion de ISAE kaj la periodaĵon Geologio Internacia, kiun li redaktis 1967 - 1990. Li aperigis E-lingvajn fakajn tekstojn en Acta Universitatis Carolinae (1964) kaj kunlaboris ĉe verkado de la esperanta Poŝatlaso de la mondo.

Honora membro de ĈEA ekde 1996.

En nia klubo li havis prelegojn pri la geologio, por kio li bezonis grandan dorsosakon plenan de ŝtonoj.

Ni plenkore gratulas al li kaj deziras multe da fortoj por pluj poresperantaj aktivadoj.

Fabelo pri la koketo kaj la kokineto

La koketo kaj la kokineto iris kune en la karkonoŝajn montojn por fragoj. Ili interkonsentis, ke ili juste interdividos la fragojn. La kokineto trovis frageton, alvokis la koketon, donis al li duonon, la alian duonon ŝi mem formanĝis. Poste la koketo trovis fragon, al la kokineto li diris nenion kaj volis la fragon sola engluti, sed la frago kroĉiĝis en lia gorĝo. La koketo balancas la kapon, streĉas la gorĝon, renversiĝas kaj levas supren la krurojn. La kokineto tion vidas, kuras al puteto por helpo kaj petas:

„Puteto, puteto!

donu al mi guton da akvo por mia koketo;

li tie sur monteto sufokiĝas, levas supren la krurojn.“

La puteto diras:

„Akvon mi ne donos al vi, se vi ne alportos al mi folieton el tilio.“

La kokineto diras al la tilio:

„Tilio, tilio!

donu folieton al puteto,

la puteto donos akvon al mia koketo.“

La tilio al la kokineto diras:

„Mi ne donos al vi la folieton, se de kudristino vi ne alportos al mi tuketon.“

La kokineto kuras, la kudristinon petas:

„Kudristino, kudristino!

donu al tilio tuketon,

ĝi donos folieton al puteto,

la puteto donos akvon al mia koketo!“

La kudristino denove diras:

„Mi ne donos al vi la tuketon, se vi ne alportos al mi silkon de reĝino de Sabenujo.“

La kokineto kuras al la Sabenino:

„Reĝineto, Sabineto,

donu al mi silketon,

por ke mi donu ĝin al kudristino,

ŝi donos al tilio tuketon,

la tilio donos folieton al puteto,

la puteto donos akvon al mia koketo.“

La reĝineto al la kokineto diras:

„Mi ne donos silketon, se vi ne donos al mi de ŝuisto belegajn ŝuojn.“

La kokineto kuras al la ŝuisto:

„Ŝuisto, ŝuisto!

donu al la reĝineto belegajn ŝuojn,

ŝi donos silketon al kudristino,

la kudristino donos tuketon al tilio, la tilio donos folieton al puteto,

la puteto donos akvon al mia koketo.“

La ŝuisto al la kokineto respondas:

„Mi ne donos al vi ŝuojn, se vi ne alportos haregojn de porkino.“

La kokineto petas:

„Porkino, porkino!

donu al ŝuisto haregojn,

li donos al mi ŝuojn,
mi donos ilin al la reĝineto,
ŝi donos silketon al kudristino,
la kudristino donos tuketon al tilio,
la tilio donos folieton al puteto,
la puteto donos akvon al mia koketo.“

La porkino diras al la kokineto:

„Mi ne donos al vi haregojn,
se vi ne donos al mi de draŝistoj senglumigitan grenon.“

La kokineto kuras kaj petas:

„Draŝistoj, draŝistoj!

donu al mi grenon,
por ke mi donu ĝin al porkino,
ĝi donos al mi haregojn,
mi donos ilin al ŝuisto,
la ŝuisto donos ŝuojn al reĝineto,
la reĝineto donos silketon al kudristino,
la kudristino donos tuketon al tilio,
la tilio donos folieton al puteto,
la puteto donos akvon al mia koketo.“

La draŝistoj al la kokineto diras:

„Ni ne donos grenon, se vi de bienestrino ne alportos kremon.“

La kokineto kuras al la bienestrino:

„Bienestrino, bienestrino!

donu al draŝistoj kremon,
ili donos grenon,
la grenon ni donos al porkino,
la porkino donos haregojn,
la haregojn por ŝuoj,
la ŝuojn al reĝineto,
la reĝineto silketon,
la silketon por tuketo,
la tuketon por folieto,
la folieto donos akvon –
akvon por koketo, kiu levas kruretojn.“

La bienestrino al la kokineto diras:

„Mi ne donos al vi kremon, se vi el la kampo ne alportos grandan tukegon da herbo.“

Antaŭ ol la kokineto ĉion plenumis kaj alportis, kaj returne al la koketo de la puteto guteton da akvo alportis, lin jam mortan ŝi trovis.

Tradukis Jiří Patera

Nigra reĝidino

En iu reĝlando la reĝo kaj la reĝino estis jam maljunaj kaj ĉiam ili ne havis la tron-heredonton. Tio estis sufiĉe malagraba, ĉar en reĝlando ekzistas neniuj balotoj kiel en respubliko. En tiu ĉi iun tagon la televido kaj la radio sciigas, ke estos balotoj, kaj la homoj iras en la lernejon kaj elektas siajn deputitojn kaj tiuj poste elektas sinjoron prezidenton. En reĝlando oni nenion tian faras, tie la reĝo kaj la reĝino atendas, kiam naskiĝos al ili reĝido, kaj tiu poste – sed nur post la morto de la maljuna reĝo – suriros la tronon. Estas glora kronado, el la reĝido estas nova reĝo kaj li reĝas. Ĉu li estu saĝa, ĉu malsaĝa.

Do en tiu ĉi reĝlando ili atendis jam ege longe, kiam naskiĝos la tronheredanto, sed ĉiam nenio. Sed tamen io nur okazis. Al la gereĝoj en ilia maljuna aĝo naskiĝis – bubino.

Nu tio ankoraŭ ne estus tiom malbona, tio jam okazis en kelkaj reĝlandoj. La reĝo venigis ĉiujn siajn konsilantojn kaj alparolis ilin:

„Estimataj konsilantoj, ni devas ŝanĝi la leĝon, por ke povu surtroniĝi mia filino, kiam filon ni ne havas.“

La konsilantoj silentis.

Entute estas hontindaĵo, ke ili devis ŝanĝi la leĝon, por ke povu sur la tronon bubino, bubinoj ja estas same saĝaj, aŭ ankaŭ same malsaĝaj, kiel buboj. Sed en tiu ĉi reĝlando okazis ankoraŭ io.

Kaj ĝuste pro tio la konsilantoj silentis. Longe ili silentis kaj poste la plej aĝa kaj la plej respektata riverencis kaj diris:

„Via moŝto, mi ne scias, ĉu estas vere, sed iu reĝa vartistino esprimis sin, ke... ke via kara filineto kaj nia plej moŝta reĝidino estas – kiel mi diru... ke ŝi estas...“

„Nigra...!“ ekkriis la reĝo.

Kaj vere. La bubino estis nigra. La okulojn ŝi havis blujajn kiel lino, sed la harojn nigrajn, krispajn, kaj tuta ŝi estis nigra.

„Kaj kio estas malbona en tio, ke ŝi ne estas rozkolora kaj ne havas ruĝan nazon kiel vi, sinjoro mia konsilanto. Ŝi eble elkreskos el tio – kaj se ne elkreskos, ŝi tamen estas mia filino kaj tronreĝidino.“

Kiel oni povas vidi, la reĝo ne rezignaciis. Kaj la reĝa volo en reĝlando validas.

Tial oni ŝanĝis la leĝon.

Al iuj regatoj tio ne plaĉis. Reĝlando ja havas neniujn civitanojn, ĝi havas regatojn. Sekve kiam bubinoj pensas, ke ili estas reĝidinoj, ho ve, en reĝlando ili ne estus reĝidinoj, sed bubinoj regataj. Ili tute ne estus pli bonstataj ol ili estas hejme. Se ne pli malbone. Ĉar la regatoj devas la reĝon obei, ĉu plaĉu al ili lia regado, aŭ ne.

Kaj tiel – kvankam sekrete – la regatoj en tiu ĉi reĝlando ne estis kontentaj pri tio, ke iam en la estonteco regos ilin nigra reĝino.

Ilia opinio estis sufiĉe stulta, ĉar la blanka haŭtkoloro kiel la nigra – ĉiam temas nur pri haŭto, kaj la ĉefa afero estas, kion kiu havas sub la ĉapo, la regatoj sub la krono. Sed malsaĝaj homoj jam estas tiaj.

Dum iu tempo estis trankvile...

Kaj dume la nigra reĝidino kreskis, ŝi jam estis sesjara kaj estis jam tempo, por ke ŝi komencu lerni. Legi, kalkuli kaj ĉion ceteran... Kaj nun aparte klare montriĝis, ke ŝi estas tre saĝa.

Jam de la beba aĝo ŝi estis lerta, ŝi ne lispis kaj ne ploraĉis pro ĉiu stultaĵo, ŝi ŝatis ridi, la reĝo kaj la reĝino ĝojis pro ŝi.

„Aŭskultu,“ demandis ŝin foje la reĝino, „ĉu vi ne volus viziti la lernejon kun la ceteraj infanoj?“

„Mi volus,“ respondis la reĝidino.

Nome la gereĝoj jam dum tempo pensis pri tio, ĉu la reĝidinon instruu la maljunaj konsilantoj kaj hejmaj instruistoj? Se ŝi vizitus la lernejon kun la ceteraj infanoj, ŝi tiel verdire unuafoje venus

en la mondon. Inter aliajn homojn ol estas la korteganoj. Tiuj konstante faras nur komplimentojn kaj plenumas ordonojn, eĉ la malgranda reĝidino ricevas pri kio ŝi decidiĝas, bonŝance ŝi volas neniujn stultaĵojn, sed tamen estus pli bone, se ŝi devus kompari sin kun la ceteraj samaĝaj samklasanaj.

Kaj tiel la reĝidino komencis iri en lernejon.

„He, ci nigra,“ diris iu bubo, „ci estos bona sole por fari je Tri Reĝoj la makulitan malantaŭe.“

„He, ci malpura blankega, kiam ci ne scios, kiom estas trioble tri, tiam ne demandu min, mi ne sufloros al ci – kaj ci estos – sapumita.“

La infanoj ridis kaj la reĝidino defendis sin, ili lasis ŝin trankvila.

Kaj kio okazis. Ĉe iu bubino perdiĝis monujo. Ŝi havis en ĝi monon por lerneja ekskurso. Ĉiuj serĉis la monujon, sed ne trovis. La reĝidino diris:

„Eksonoru, moneretoj.“

Kaj en la suba poŝo de iu samklasanino io ektintis. Estis la mono en la perdita monujo. Ŝi estis hontigita, tiu malgranda ŝtelistino.

Ĉe tio montriĝis, ke la nigra reĝidino scipovas iom sorĉi.

Baldaŭ tiun ĉi ŝian kapablon oni komencis utiligi ne nur en la lernejo, tie aperis plu neniuj malgranda ŝtelisteto, sed en la tuta ĉirkaŭaĵo. Sufiĉis, ke ŝi kulpatestis kelkajn poŝoŝtelistojn, la ceteraj gardis siajn kvin fingrojn, por ke ili ne plu ĉasu ie senutile.

La reĝo kaj la reĝino vidis, kion ĉion oni povus per tiu ĉi eco de la nigra reĝidino rebonigi en la tuta reĝlando, ĉar ŝtelemo estis tie ĉie abundega, sed ili ankaŭ komencis timi pri la reĝidino. Por ke iu granda ŝtelisto ne lezu ŝin. Pro tio la reĝo ordonis, ke en la lernejon kaj el la lernejo akompanu ŝin gardistoj. Sed al la reĝidino tio ne plaĉis.

„Ĉu vi scias kion,“ diris la reĝidino al la gardistoj, tuj kiam ili eliris el la kastelo. „Mi iros sola kaj vi iru, kien vi volas, sed vi devas esti ĉi tie, kiam mi revenos el la lernejo. Vi ĉi tie ree akompanos min. En la lernejo vi senutile sidas kaj ĝenas en la koridoro, krakrompas nuksojn kaj la ŝelojn ĵetas sur la plankon. La lernejservisto jam koleris, ke li devas balai.“

„Tio ne eblas,“ respondis anstataŭ ili la plej fortika gardisto.

„Kial tio ne eblas, vi ja iras kun mi malvolonte.“

„Sed volonte, ni volonte iras kun vi,“ ili voĉis grupe.

Sed nun denove okazis io neordinara. Ĉiuj, kiuj tiel humuligite hurlis, havis subite la buŝon kurban ĝis la orelo kaj ankoraŭ plie elfalis unu ilia antaŭa dento.

„Tion vi havas pro tio, ke vi mensogas,“ diris la reĝidino. „Post kiam vi konfesos la veron, via buŝo rektiĝos kaj la dento denove elkreskos.“

La gardistoj estis tiom teruritaj, ke kun la tiel kurbaj buŝoj ili kuris al la reĝo kaj plendis.

La reĝo alvokis la reĝidinin, la afero iel ordiĝis, sed ree estis klare, ke la nigra reĝidino scipovas sorĉi. Kiam tio disfamiĝis tra la reĝlando, aperis sufiĉe da ekscitiĝo.

Kaj enmiksiĝis en tion sinjoroj juĝistoj.

Ili petpostulis aŭdiencon ĉe la reĝo.

„Ni insiste petas, sinjoro reĝo,“ ili ekparolis en la aŭdienco, „ke la moŝta reĝidino solene partoprenu ĉiujn traktadojn kaj helpu al ni ĉe la juĝado.“

„Tio ne eblas,“ oponis la reĝo. „La reĝidino ja devas iri en la lernejon kaj lerni.“

Kaj ankoraŭ pro alia kaŭzo tio ne eblis. La reĝidino povis malkaŝi la mensogon nur kiam ŝi sciis, ke tio kion oni tiumomente diras, la mensogo efektive estas.

Cetere tiu ĉi ŝia kapablo faris bonajn servojn, homoj ne sciis, kion la reĝidino scias kaj kion ne, kaj estis atentemaj por ne mensogi. Se la gereĝoj ne timus pri la reĝidino, la reĝlando havus nur utilon pro la sorĉoj de la reĝidino, ĉar jam ŝajnis, ke la regatoj estos tre verdiremaj.

Bedaŭrinde estis ankoraŭ sufiĉe da aliaj eksceso. Do ekzemple la homoj interbatiĝis. En gastejoj, aŭ ekstere sur la placo, tuj kiam iu sentis sin ofendita, tuj li manbatalis. Tio denunciĝis al la reĝidino – kaj tuj ŝi sciis, kiel tion solvi. Kiam iu kaŭzis interbatiĝon, aŭ entute iun tumulton, liaj manoj mem kunligiĝis malantaŭ la dorso. Se li ĉe tio ankoraŭ mensogis, kurbiĝis lia buŝo, elfalis dento, nu – imagu kiel la luktantoj aspektis!

Pri la nigra reĝidino oni rakontis mirindaĵojn. Ĉiu fabelisto ankoraŭ aldonis pecon da ia plua miraklo, nu la reĝlando estis plena de tio, kaj kion plie, oni eksciis pri tio ankaŭ en la najbara

reĝlando. Tie regis tre fiera juna reĝo. Li decidiĝis efektiviĝi militiron en la reĝlandon de la maljuna reĝo kaj de lia filino la nigra reĝidino. Ŝajnis, ke post la landlimoj ŝiaj sorĉoj ne efikas, ĉar ĉiujn preparojn la fiera reĝo sukcesis kaŝi. La fiera reĝo havis intencon la reĝidino forrabi kaj ekspluati ŝiajn servojn en sia mensogplena, ŝtelistema kaj interbatiĝema reĝlando.

„Mi bezonas fortan, bone ekzercitan militistaron,“ li ordonis al siaj generaloj. Kaj tian militistaron li baldaŭ havis.

La maljuna reĝo dume atentis nur pri la hejmlandaj krimuloj, la reĝidino ĉiam gardis la gardistoj, kaj ili jam vere ŝatis gardi ŝin, kaj ŝi devis kontentiĝi kun tio, nenio alia estis farebla.

Ĉe landlimoj de la reĝlando jam staris armitaj hordoj de la fiera reĝo, kiam nur tiam en la kastelon alrajdis surĉevale regatoj el la limregiono – kaj sciigis al la gereĝoj, kio okazas. Do nun maljunulino, konsilu. Tio estas: nigra reĝidino, konsilu.

Sed la maljuna reĝo kaj la reĝino volis al sia filino pri la terura danĝero kaj pri la preparata milito tute nenion diri. Ili timis pri ŝi pli multe ol antaŭe. Ĉiuj korteganoj devis promesi, ke ili silentos, al la reĝidino eĉ ne pepon, laŭ la reĝa odrono la gardistoj rapide prenis ŝin kaj fermis en rigore gardatan turon. Kaj ĉiuj fidelaj regatoj estis decidiĝintaj, ke ili submetiĝos al la decida batalo kun la fiera reĝo. Bonŝance la maljuna vartistino, kiu al la reĝidino portis manĝaĵon, ne obeis la malpermesojn kaj ĉion malkaŝis al ŝi.

„Do ni estas en vera kaĉo,“ diris la reĝidino. „Sed ni vidos. Mi tion iom pripensos.“

Kaj ŝi pripensis.

Kiam la sekvintan tagon la vartistino denove alportis al ŝi manĝaĵon, ĝi estis de la reĝidino ŝatataj patflanoj palaĉinkoj, ili manĝis kune kaj la reĝidino prirakontis al la vartistino sian planon.

„Pro tia distanco mi ne povas al la fiera reĝo doni lecionon kiel decas. Ni devas tion fari poioime. Nun mi transformos vin en hirundon kaj vi flugos al li.“

„Por vi ĉion,“ respondis la vartistino, „sed ĉu li ne mortigos min?“

„Li ne mortigos, se li volos ricevi min – kaj al tio vi helpas al li.“

„Tion ne, tion ja ne,“ defendis sin la vartistino.

„Nenion timu. Kiam ĉe la fiera reĝo vi tuŝos la plankon, vi transformiĝos reen en homon, en mian vartistinon. Diru al li, ke vi estas mia sendito, ke mi ĉion regas, ke se li plenumos miajn kondiĉojn, li ricevos min.“

„Kaj la kondiĉoj...“ demandis la vartistino.

„Tuj li devas malfondi sian militistaron kaj reveni en sian kastelon. Kiam li plenumos vian postulon, vi revenos al mi. Mi metos en vian bekon mian etan harfasketon, tiun vi volvos ĉirkaŭ via mano kaj rap-rap! vi estos ree hirundo. Tio ankaŭ helpus al vi, se li eble rifuzus plenumi mian deziron. Sed li eble ne rifuzos. Li opinias, ke li sukcesos havi min en sia potenco. Nur nenion konfuzu kaj trankvile promesu al li, ke vi mem revenos kaj ke mi venos kun vi, kiam li ĉion, kion mi postulas, plenumos.“

„Sed oni ja sentos ĉi tie hejme vian malĉeeston, dum antaŭ ol la fiera reĝo malfondos sian militistaron kaj revenos en sian kastelon.“

